Raporto de la Prezidanto de Esperanto-USA

Majo 2009

La jaro 2008 alportis al ni stabilan vivon post la nom-sanĝiĝo, nova retbutiko en nia retpaĝaro, kaj translokiĝo de nia centra-oficejo. Tamen, ni denove translokiĝos tujtuj post la landa kongreso en Sankta Luiso pro la nuntempa ekonomia stato. Bonŝance ni havos sufiĉe bonan lokon por nia Centra Oficejo kontraŭ malplikosta lu-pago. Dankon al Vilĉjo Harris kaj Vilĉjo Harmon por pritrakti la rilatojn kun la pasintaj, nunaj, kaj venontaj luigantoj.

Post du sukcesaj eksterlandaj kongresaj en Meksiko (2007) kaj Kanado (2008) ni havos serion de kongresoj en Usono. Mi petas al vi anonci datojn kaj lokojn de niaj landaj kongresoj, NASK (la Nord-Amerika Somera Kursaro), kaj regionaj kongresoj en viaj lokaj grupoj, interretaj listgrupoj, kaj konversaciaj rondoj. Kompreneble, nia ĉefa organo **Usona Esperantisto**, kaj nia retpaĝaro, estas efikaj fontoj de informo rilate al ĉi tiuj interesaj eventoj.

Mi petas, bonvolu rekomendi al viaj amikoj aliĝi al Esperanto-USA se ili ankoraŭ ne membriĝis. Ofte, bezonas nur anonco aŭ peto por akiri novajn membrojn. Se aperos diskuto pri la kotizo por Esperanto-USA, mi rekomendos ke ni ne plialtigu nian kotizon.

Dankon al niaj estraranoj, komitatoj, lokaj grupoj, kaj ĉiuj membroj por esti parto de Esperantujo. Ek kaj antaŭen!

Amike k kunlabore,
Filipo DORCAS, prezidanto, Esperanto-USA
filipo@grupoj.org